PILO-PRESS
Interncia Informservo

Jara abono 1977
30,-- DM
==========
Abonu nun!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 45/76 - 19 nov 1976
Aperas ĉiusemajne

## Honorigo por Walter Poppeck

Oberkirch. (pp) Pro specialaj meritoj por la ŝtato kaj popolo la federacia prezidento dediĉis al Walter Poppeck estro de la Esperanto-Grupo Oberkirch, la MERIT-KRUCON je la bendo de la Meritordeno de la Federacia Respubliko Germanio.



Jerzy Grum (Mitte), Redakteur der Esperantosendungen im polnischen Rundfunk, trinkt mit dem 1. Beigeordneten Lothar Seiler (links) und dem Vorsitzenden der Esperantogruppe, F. W. Poppeck, auf das Wohl der Stadt Oberkirch. Aufn.: F. W. Poppeck

La honoriga kaj transdona ceremonio okazos, sabate, la 20-an de novembro 1976, je la 11-a horo, en la salono de la Urba Halo de Oberkirch, al kiu invitis la Ortenaudistrikto de la Germana Sindikata Asocio. La gratulon de la GEA-estraro transdonos s-ro Hermann Heiss. Ni kore gratulas!

La supra foto montras s-ron Walter Poppeck(dekstre) dum akcepto por s-ro Jerzy Grum en la urbodomo de Oberkirch okaze de la prelego de la pola Esperanto-redaktoro en Oberkirch. Maldekstre sidas Skabeno Lothar Seiler, kiu akceptis la polan gaston.

***************************

## Prelegoj de René Llechwalter

Perpignan (pp) - S-ro René Llechwalter, delegito de U.F.E. en Perpignan, prelegis la 28-an de oktobro en Manresa, Hispanujo, pri la Rusiljonaj poetoj, en kataluna lingvo. Li bedaŭris, ke en la loko ne estas delegito de UEA, tamen loĝas en la urbo bonaj esperantistoj kiel Tuset, Saumell kaj la poetino Lola Estrada kaj certe ankaŭ aliaj.

La 29-an de oktobro li vizitis la esperantistaron de Sabadell, proksime de Manresa kaj konstatis kun ĝojo, ke tie funkcias semajne 4 kursoj kun 60 gelernantoj. Kun ĝojo Llech-Walter revidis s-aninon Criach kaj s-anojn Puig, Llusera kaj Salvador Aragay, ĉefredaktoron de "Boletin", la revuo de la Hispana Esperanto-Federacio.

## Pri la 62-a Universala Kongreso

Rotterdam (uea/pp) - Laŭ la ĵus aperinta 2-a Oficiala Komuniko al la Universala Kongreso en Islando jam aliĝis 400 personoj el 38 landoj.

Du karavanoj jam fiksis siajn prezojn por la vojaĝo al Islando: Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj) flugprezo ekde Kopenhago, Stockholmo, Oslo aŭ Helsinki 1 495 danaj kronoj (ekskluzive de hotelo).

Turisma Servo de Norvega Esperanto-Ligo (Boks 942, Oslo 1), flugprezo ekde Oslo 1090 norvegaj kronoj (ekskluzive de hotelo).

## Pri la Esperanto-Centro Dr. Zamenhof

Hamburg (pp) - La 4-an de novembro okazis la jarĉefkunveno de la "Esperanto-Centro Dr. Zamenhof domo por internaciaj renkontiĝoj" en ĉeesto de 12 membroj.

Laŭ la kasista raporto la societo nun disponas pri kapitalo de 41,100 GM,do nur pri kvarono de necesa sumo de 200 000 GM. Tiu stato laŭ s-ro Wielgus ne ebligas serioze trakti pri aĉeto de taŭga objekto.

Se la nombro de akciuloj en baldaŭa estonto ne konsiderinde kreskos, tiam estos dubinde ĉu la plano, aĉeti domon por internaciaj renkontiĝoj, estos realigebla.

## Esperanto-Konferenco en Leipzig

Leipzig. (pp) - En ĉeesto de 200 delegitoj kaj gastoj el socialismaj landoj okazis la dua tutlanda kunveno de la esperantistoj en Germana Demokratia Respubliko. Inter la gastoj estis ankaŭ d-ro Magomet J. Isaev, Moskvo. Prezidanto de la Centra Laborrondo Esperanto de GDR denove fariĝis Rudi Graetz, ĝenerala sekretario denove d-ro Detlev Blanke.

## Esperanto-agado ĉe la universitato

Bonn (pp) - De la 21-a ĝis la 25-a de oktobro la esperantistoj de la universitato de Bonn post funda preparado okazigis Esperanto-ekspozicion en la studenta manĝejo, kiu trovis multan intereson. Minimume mil personoj estis rekte alparolitaj; viglaj diskutoj ne maloftis. La 25-an de oktobro okazis la tradicia informa vespero ĉe vino kaj fromaĝo, al kiu bedaŭrinde nur venis 25 aŭ 30 personoj.

Realiĝis nova kurso por komencantoj sub gvidado de Yashovardhan kun 10 partoprenantoj kaj duagrada kurso sub gvido de Klaus-Peter Fritz kaj Hartmut Trunte kun 7 partoprenantoj en la unua ŝtupo (ekzercoj, iom da gramatiko) kaj 10 partoprenantoj en la dua ŝtupo (diskutrondo).

La plej aktivaj membroj, kiuj jam aŭtoris la lernolibron "Praktiku kun ni Esperanton", - bedaŭrinde sen Maren Fittschen, kiu intertempe laboras en Hamburg, sed kun Dagmar Fries, kiu tre kompetentas pri moderna lingvistiko kaj sintakso speciale kaj promesis kunlabori -, plibonige prilaboros la libron. Cetere, dum 6 monatoj jam vendiĝis 150 ekzempleroj de la lernolibro. La libro vendiĝis en ok landoj: F R Germanio, Luksemburgio (40 ekzempleroj), Francio, Nederlando, Italio, Pollando, Aŭstrio kaj Sovetunio.

La 25-an de oktobro fondiĝis Esperantista Grupo Universitata de Bonn, registrita ĉe Studentenwerk.(EGU). Prezidanto de EGU estas Hartmut Trunte, vicprezidanto Yashovardhan. Ĝis nun aliĝis 20 membroj.

Homoj kaj Nomoj
kun kaj sen Renomoj

D-ro Detlev Blanke, ĝenerala sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en GDR, en intervjuo kun Pola Radio fine de la laborkonferenco en Leipzig, diris, ke la varba laboro por Esperanto en GDR orientiĝos estonte pli je la objektivaj bezonoj de la homoj por internacia lingvo kaj malpli je la argumentoj por la solvo de la monda lingva problemo.

Prof. E. Fenyvesi, Budapeŝto, nome de la redaktoraro de Hungara Vivo skribis al Pilo-Press: "Kun danko ni ricevis la lastan Pilo-Press-eldonaĵon, n-ron 39/76. Kiel vi rimarkis en niaj revuoj, ni ofte utiligas ties informojn, kaj mencias viajn eldonaĵojn laŭde, precipe, por tiamaniere helpi vian tre utilan kaj vere necesan agadon en la preso-sfero......Ni forte gratulas al vi pro via celkonscia kaj lertamana agado, pro la valoraj periodaĵoj, kaj kuraĝigas vin al plua agado."

S-ino Elsbeth Bormann, Hamburg, GEA-estraranino, verkis ampleksan raporton en germana lingvo pri la agado de la Esperanto-movado okaze de la "Internacia Jaro de la Virino".

Jerzy Grum, Varsovio, Esperanto-redaktoro de Pola Radio, raportos en la venonta Esperanto-Ekspreso pri sia prelegvojaĝo ĉe Esperanto-grupoj en Federacia Respubliko Germanujo.

S-ino Margarete Hampf-Holm, Bad Soden, esperantistino de pli ol 50 jaroj, bedaŭrinde nun tute blindiĝinta, festis la 31-an de oktobro la 85-an datrevenon de sia naskiĝo. Ŝi eklernis Esperanton ĉe Eugen Wüster, siatempe gimnaziano kaj poste konatiĝis kun d-ro Dietterle, la direktoro de la tiama Germana Esperanto-Instituto por la Germana Regno. Kvankam dependa de akompananta persono ŝi dum aprilo ĉi-jara vojaĝis al Frankfurt por partopreni la printempan ROMOLO-kunvenon.

****************

## Esperanto en Radio

Varsovio. Ĉefa ero de la pasinta Esperanto-Ekspreso estis intervjuo kun d-ro Detlev Blanke, CLE-sekretario, pri la rezultoj de la Esperanto-konferenco de Centra Laborrondo en Leipzig. Intervjuis Jerzy Grum, kiu ĉeestis la konferencon. - El la leterkesto ni eksciis, ke en la semajno inter la 12-a kaj 18-a de novembro alvenis en la Esperanto-Redakcio 150 korespondaĵoj. Entute alvenis ĝis nun en la jaro 1976 5 126 korespondaĵoj. - El la leterkesto ni krome informiĝis, ke la Esperanto-anguletoj en nacilingvaj programoj bedaŭrinde ne trovas multe da reagoj fare de esperantistoj. Tamen estis farita la decido, ke la dimanĉa Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo nun estas aŭdebla trifoje, nome:

je la 6,30 horo sur ondoj 41 m, 49 m, 75 m, 200 m

je la 17,30 horo sur ondoj 41 m, 49 m

je la 22,00 horo sur ondoj 41 m, 49 m

La anguleto aŭdiĝas ĉiam je la fino de la duonhora programo!

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur ĉi-foje parolis pri Svislando kaj la internaciaj organizoj.

Romo. Malgraŭ perturboj mi povis aŭdi la Roman voĉon, tamen nur malbone komprenebla.

Vieno. En Aŭstrio okazis la sekreta kapnombrado pri lingvaneco, dimanĉe, la 14.11.76. Pri tio temis ankaŭ la ĉi-semajna komentario de d-ro Alfred Macher, kiun prezentis d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal. Cetere, d-ro Beckmann povis festi la 70-an datrevenon de sia naskiĝo, la 7-an de novembro. Koran gratulon postfeste!

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando
Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Stataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

6,00 horo ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m
16,30 horo ondolongoj: 25 m, 31 m, 41 m
22,30 horo ondolongoj: 41 m, 49 m, 75 m, 200 m